



La bananoj de avinjo

Grandma's bananas

 Ursula Nafula

 Catherine Groenewald

 Penelope Vos

 4

 Esperanto / English



La ĝardeno de avinjo estis mirinda, plena da sorgo, milio kaj manioko. Sed plej bonaj de ĉio estis la bananoj. Kvankam avinjo havis multajn genepojn, mi sekrete sciis, ke mi estas ŝia plej ŝatata. Ŝi ofte invitis min al sia domo. Ŝi ankaŭ diris al mi sekretetojn. Sed estis unu sekreto, kiun ŝi ne dividis kun mi: kie ŝi maturigis bananojn.

...

Grandma's garden was wonderful, full of sorghum, millet, and cassava. But best of all were the bananas. Although Grandma had many grandchildren, I secretly knew that I was her favourite. She invited me often to her house. She also told me little secrets. But there was one secret she did not share with me: where she ripened bananas.



Iun tagon mi vidis grandan pajlan korbon metitan en la sunbrilo ekster la domo de avino. Kiam mi demandis, por kio ĝi utilas, la sola respondo, kiun mi ricevis, estis: “Ĝi estas mia magia korbo.” Apud la korbo, estis pluraj bananfolioj, kiujn avino turnis de tempo al tempo. Mi scivolis. “Por kio servas la folioj, avinjo?” Mi demandis. La sola respondo, kiun mi ricevis, estis: “Ili estas miaj magiaj folioj.”

...

One day I saw a big straw basket placed in the sun outside Grandma’s house. When I asked what it was for, the only answer I got was, “It’s my magic basket.” Next to the basket, there were several banana leaves that Grandma turned from time to time. I was curious. “What are the leaves for, Grandma?” I asked. The only answer I got was, “They are my magic leaves.”



Estis tre interesa rigardi Avinjon, la bananojn, la bananajn foliojn kaj la grandan pajlan korbon. Sed avinjo sendis min al mia patrino pro komisio. "Avinjo, mi petas, lasu min rigardi dum vi preparas ..." "Ne obstinu, infano, faru tion, kion oni diras al vi," ŝi insistis. Mi ekkuris.

...

It was so interesting watching Grandma, the bananas, the banana leaves and the big straw basket. But Grandma sent me off to my mother on an errand. "Grandma, please, let me watch as you prepare..." "Don't be stubborn, child, do as you are told," she insisted. I took off running.



Kiam mi revenis, avinjo sidis ekstere sed kun nek la korbo nek la bananoj. "Avinjo, kie estas la korbo, kie estas ĉiuj bananoj, kaj kie ..." Sed la sola respondo, kiun mi ricevis, estis: "Ili estas en mia magia loko." Ĝi estis tre seniluziiga!

...

When I returned, Grandma was sitting outside but with neither the basket nor the bananas. "Grandma, where is the basket, where are all the bananas, and where..." But the only answer I got was, "They are in my magic place." It was so disappointing!



Du tagojn poste, avinjo sendis min preni ŝian bastonon el sia dormoĉambro. Tuj kiam mi malfermis la pordon, bonvenigis min la fortaodoro de maturaj bananoj. En la interna ĉambro estis la granda magia pajla korbo de avinjo. Ĝi estis bone kaŝita sub malnova litkovrilo. Mi levis ĝin kaj flaris tiun gloran odoron.

...

Two days later, Grandma sent me to fetch her walking stick from her bedroom. As soon as I opened the door, I was welcomed by the strong smell of ripening bananas. In the inner room was grandma's big magic straw basket. It was well hidden by an old blanket. I lifted it and sniffed that glorious smell.



La voĉo de avinjo surprizis min, kiam ŝi vokis: “Kion vi faras? Rapidu kaj alportu al mi la bastonon.” Mi elrapidis kun ŝia bastono. “Pri kio vi ridetas?” Avinjo demandis. Ŝia demando konstatigis min, ke mi ankoraŭ ridetis pro la malkovro de ŝia magia loko.

...

Grandma’s voice startled me when she called, “What are you doing? Hurry up and bring me the stick.” I hurried out with her walking stick. “What are you smiling about?” Grandma asked. Her question made me realise that I was still smiling at the discovery of her magic place.



La sekvan tagon, kiam avinjo vizitis mian patrinon, mi rapidis al ŝia domo por denove kontroli la bananojn. Estis aro tre matura. Mi elektis unu kaj kaŝis ĝin en mia robo. Ree kovrinte la korbon, mi iris malantaŭ la domon kaj rapide manĝis ĝin. Ĝi estis la plej dolĉa banano, kiun mi iam gustumis.

...

The following day when grandma came to visit my mother, I rushed to her house to check the bananas once more. There was a bunch of very ripe ones. I picked one and hid it in my dress. After covering the basket again, I went behind the house and quickly ate it. It was the sweetest banana I had ever tasted.



La sekvan tagon, kiam avinjo estis en la ĝardeno, rikoltante legomojn, mi enŝteliĝis kaj rigardis la bananojn. Preskaŭ ĉiuj maturiĝis. Mi ne povis ne preni kvar. Dum mi piedpintis al la pordo, mi aŭdis la tuson de avinjo ekstere. Mi sukcesis ekkaŝi la bananojn sub mia robo kaj preterpasis ŝin.

...

The following day, when grandma was in the garden picking vegetables, I sneaked in and peered at the bananas. Nearly all were ripe. I couldn't help taking a bunch of four. As I tiptoed towards the door, I heard grandma coughing outside. I just managed to hide the bananas under my dress and walked past her.



La sekva tago estis bazara tago. Avinjo frue vekigis. Ŝi ĉiam prenis maturajn bananojn kaj maniokon por vendi en la bazaro. Mi ne rapidis viziti ŝin tiun tagon. Sed mi ne povis eviti ŝin longe.

...

The following day was market day. Grandma woke up early. She always took ripe bananas and cassava to sell at the market. I did not hurry to visit her that day. But I could not avoid her for long.



Poste tiun vesperon vokis min mia patrino kaj patro, kaj Avinjo. Mi sciis kial. Tiun nokton, kiam mi ekdormis, mi sciis, ke mi neniam plu povos ŝteli, ne de avinjo, ne de miaj gepatroj, kaj certe ne de iu alia.

...

Later that evening I was called by my mother and father, and Grandma. I knew why. That night as I lay down to sleep, I knew I could never steal again, not from grandma, not from my parents, and certainly not from anyone else.





Global Storybooks

globalstorybooks.net

La bananoj de avinjo

Grandma's bananas

 Ursula Nafula

 Catherine Groenewald

 Penelope Vos (eo)

